Johann Gottfried Hientzsch,

# Kanto de ligo

*tradukita de Ludwig Lazarus Zamenhof*

Fratoj, manon donu kore
Kaj senzorge, sendolore
Belan horon festu ni!
Ĉion teran forĵetante,
Daŭru forte kaj konstante,
Nia bela harmoni'!

Al la Dio kantu gloron:
La spiriton kaj la koron
Kial donis la ĉiel'?
Serĉi lumon por vereco,
Serĉi virton per justeco
Estu nia sankta cel'!

Homoj en la oriento,
Homoj en la okcidento.
En la sud' kaj en la nord'!
Alte teni homan nomon,
Kore ami ĉiun homon
Estu nia liga vort'.

...

Johann Gottfried Hientzsch,

# Bundeslied

Brüder, reicht die Hand zum Bunde!
Diese schöne Feierstunde
Führ uns hin zu lichten Höhn!
Laßt, was irdisch ist, entfliehen,
Unsrer Freundschaft Harmonien
|: Dauern ewig, fest und schön. :|

Preis und Dank dem Weltenmeister,
Der die Herzen, der die Geister
Für ein ewig Wirken schuf!
Licht und Recht und Tugend schaffen
Durch der Wahrheit heil'ge Waffen,
|: Sei uns göttlicher Beruf. :|

Ihr, auf diesem Stern die Besten,
Menschen all im Ost und Westen
Wie im Süden und im Nord!
Wahrheit suchen, Tugend üben,
Gott und Menschen herzlich lieben,
|: Das sei unser Lösungswort. :|

...

*Traduko de la Germana poemo "Bundeslied" de* Johann Gottfried Hientzsch *(∗1787 – †1856) en Esperanton de* Ludwig Lazarus Zamenhof *(Ludoviko Lazaro Zamenhofo, ∗1859-12-15 – †1917-04-14).*

*Arg-279-569 (2014-02-15 13:23:44)*

*Tiun ĉi tradukon mi prenis el la interretejo "http://www.cezarkulturo.de/154385.html" de Hans-Georg Kaiser (Cezar). Ĝi troviĝas ankaŭ en la kolekto "www.literaturo.dk" sub* `http://literaturo.dk/novaj.htm`.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas* Johann Gottfried Hientzsch *(∗1787 – †1856).*

*Arg-279-567 (2014-02-15 13:15:36)*

*La melodion verkis laŭdire Wolfgang Amadeus Mozart (1756 - 1791)por la framasonistoj. Sed tio ne estas certa. Ĝi estas framasonista konsekra kanto. La melodio estas aŭdebla tie:* `http://ingeb.org/Lieder/BruderRe.html` *. Siehe auch:* `http://de.wikipedia.org/wiki/BrΓëder_reicht_die_Hand_zum_Bunde` .